ESPERANTO
INTERNACIA LINGVO

# ELNA-BULTENO

## ESPERANTO-LIGO POR NORDA AMERIKO

Numero 14(72) Majo 1972

### NOVA ESPERANTO-BULTENO EN OHIO

La unua numero de la TEKO, oficiala bulteno de la Toledo Esperanto-Klubo (TEK), aperis ĉi tiun monaton. Ĝi havis ses paĝojn, kaj la plejparto havis anglan tradukon flanke por komencantoj. La bulteno havas belan aspekton, kaj la unua eldono entenis plurajn anoncojn, novaĵojn, kaj informojn pri la movado. TEK ne postulas membro-pagon, sed akceptas donacojn de anoj por poŝtkostoj. Ni gratulas ilin pro la videbla sukceso kiun ili jam havis. La adreso estas: 1032 Orchard Street, Toledo, Ohio 43609.

### GAZETO ELDONIS ARTIKOLON PRI ESPERANTO EN PENNSYLVANIA

La monata gazeto MEMO, eldonata en Coopersburg, Pa. (18036), je la komenco de la aprila numero enhavis longan artikolon pri la Internacia Lingvo. S-ino Helen Hammarstrom, kiu faris la 5-paĝan verkon, ne nur raportis la faktojn pri aferoj en la regiono, sed vere sin montris saĝe, inkluzivante konceptojn, ideojn, kaj citaĵojn kiuj kaŭzis profundan penson. Ŝajnas al ni, ke ŝi preskaŭ fariĝis esperantistino dum ŝia laboro. Kunvenon ŝi vizitis de du lokaj grupoj (Amikoj de Esperanto ĉe Muhlenberg College, kaj la Esperanto-Klubo Donald Munro), kie oni parolis nur Esperanton, kaj ŝi komprenis preskaŭ ĉion! Profitiĝis do kaj ŝi kaj la movado.

### VERKAĴO DE CATHY SCHULZE APERIS EN INTERNACIA GAZETO

Per artikolo "Motoroj de la Movado en Usono" komencis ESPERANTO, la oficiala organo de UEA, sian aprilan numeron. Verkita de Cathy Schulze, ĝi priskribis la staton de la Internacia Lingvo en usono, preparis la venontojn al la 57a UK en Portlando por la ne-tipa, pli intima kongreso kiu ĝi estos, kaj nomis la individuojn kiuj plejforte subtenas la esperantajn aferojn en nia lando. Ĉiuj estas fieraj pri la laboro de ĉi tiu elstara kaj kompetenta virino, kaj ni dankas ŝin.

### ANNE WHITTEKER HONORIĜIS EN PORTLAND

Agema virino konata de la Esperanto movado usona, Anne Whitteker, kiu antaŭ nelonge aĉetis domon pli proksima al la urbocentro de Portlando (la adreso: 20 S. W. Mitchell, Portland, Or. 97201), kie S-ro Mikulas Nevan, konstanta Sekretario por la 57a UK (29 julio - 5 aŭgusto), povus loĝi, ricevis surprizon la 22an de aprilo, 1972, sabaton. Ŝi pensis, ke la sola kialo por la afero tiam en la nova domo estis bonvenigo por la familio Nevan; sed fakte oni celebris "domvarmigon" kaj honorigis ŝin! Ĉi tiu tre vigla virino certe meritas sinceran dankon pro la senlaca laboro kiun ŝi donis por la sukceso de Esperanto en usono.

### SUKCESIS LA REGIONA KONFERENCO DE LA OKCIDENTA MARBORDO

La 7an ĝis la 9a de aprilo, 1972, kunvenis en Berkely, California, la reprezentantoj kaj la delegitoj al la Esperanto-Konferenco Regiona de la Okcidenta Marbordo. Ĉeestis ankaŭ du vizitantoj el Svedujo. Oni priparolis precipe preparadon por la venonta UK kaj la plurajn Esperanto-kursojn en la regiono. En la akirado de pli multe da helpantoj por la UK oni ankaŭ povis sukcesi!

# ELNA-BULTENO

**ADRESO** : ELNA-BULTENO, MUHLENBERG COLLEGE, ALLENTOWN, PA. 18104

---

NOVAJ ESPERANTISTOJ STUDAS EN WASHINGTON

La familio Al Estling, en Walla Walla, Wash., ne haltis la instruon de Esperanto. Sara Ann aranĝis novan klason da 12 ok-gradaj studantoj, kiuj ge-komencantoj kunvenas ĉiutage kaj studas la Internacian Lingvon. Ili studas la "Junul-Kurson" (SAT-Amikaro, Paris). Same kiel la studantoj ĉe Whitman College, ĉi tiuj junuloj havas grandan entuziasmon pri la lingvo.

JUNAJ LERNANTOJ LABORAS EN OREGON

Ĝis la mezo de junio studos la 25 anoj de la Esperanto-Klaso de S-ro Jim Deer en la urbo-biblioteko de Portlando. La studgrupo komencis laboron la 10an de aprilo, kaj kunvenas je 7:30 ptm.

LINGVAJ EKZAMENOJ ESTOS HAVEBLAJ ĈE LA UK

La Internacia Ekzamena Komisiono denove ekzamenos kandidatojn okaze de la Universala Kongreso (57a UK, 29 julio - 5 aŭgusto) en Portlando. Personoj kiuj deziras informiĝi, bonvolu skribi al la Sekretario: D-ro J. C. Wells, 17 Ashbourne Terrace, London S.W. 19, England.

MONDFAMA NOMO RE-APERAS EN CALIFORNIA

En la listo da honoraj membroj por la Universala Kongreso venonta en usono, kiu inkluzivas, i. a., ekzemple, D-ro Linus Pauling kaj Hannes Alfven, ricevintoj de la pac-premio Nobel, oni trovos alian pli-konatan nomon: D-ro Zamenhof! Jes, D-ro Stephen Zamenhof, nepo de la kreinto de Esperanto, kaj instruisto ĉe la Universitato California, estas ankaŭ honora membro!

KVARA TUTŜTATA ESPERANTO-KONGRESO PRETIĜAS EN OHIO

Dimanĉon, la 25an de junio, 1972, apud usona ŝoseo 23, kvar mejlojn norde de Worthington, Oh., je la 10a horo atm. komenciĝos la tutŝtata Kunveno. Post diservo la partoprenontoj aŭdos poemojn, rakontojn, ŝercojn, ktp. Por aliaj informoj pri ĉi tiu kongreso, skribu al S-ro David Robert Morey, 3978 Karl Road, Apt. 15, Columbus, Oh. 43229.

SENPAGA RADIO-BROŜURO PRI PROGRAMOJ EN ESPERANTO EL SVISLANDO HAVEBLA

La svisa kurtonda radio solenas ĉi-jare la 25an datrevenon de la enkonduko de Esperanto en siajn programojn. Tio samtempe estos persona jubileo por D-ro Arthur Baur, Esperanto-Radio-Parolisto. Ankaŭ, S-ro Claude Gacond (kiel heredanto de la tradicio de Edmond Privat, kiu estis la unua parolinto en la svisa kurtonda radio) ankoraŭ sin dediĉos al la uzo de la lingvo. La programoj el svislando aŭdiĝis kaj ĝuiĝis ĉirkaŭ la mondo, sed necesas daŭre certigi ĝin per leteroj de aŭskultantoj. Se plaĉas al vi, petu la broŝuron: Program Guide of the European and Overseas Service of the Swiss Broadcasting Corporation, CH-3000, Bern 16, Switzerland.

ESPERANTO VENKAS KONTRAŬSTARANTOJN ĈE LA UNIVERSITATO SUDA ILLINOIS

Kvankam la estro de la fako lingvistika ĉe la Universitato Suda Illinois, Carbondale, Ill. 62901, kontraŭstaras Esperanton (kaŭze de ne-scio kaj antaŭjuĝo), la administracio akceptis la Esperanto-klubon kiel oficialan studantgrupon. Leteroj al la redakcio de la ĵurnalo "Daily Egyptian" montras, ke la sama malnova rakonto sin ripetas tie, kiel en tiom tra usono. Sed la grupo tie kreskas, kaj fariĝis vigla. La prezidanto estas Aline Davis, la vic-prez. Rich Ranc, sekretariino Karen Wade, kasisto Chuck Knuth. John Gadway, instruisto de fremdlingvoj, estas la fakulara konsilanto. Gratulojn oni sendas al ili.

LEGANTOJ RAPIDE RESPONDIS AL REKLAMO

S-ro Conrad Fisher, RFD-1, Meadeville, Pa. 16335, enmetis anoncon en "Linn's Stamp News," ke filatelistoj povus senpage ricevi kvar glumarkojn de la 57a UK, memore al la 54a datreveno de la morto de D-ro Zamenhof, nur kontraŭ la sendo de jam adresita koverto. Li tuj ricevis pli ol 100 mendojn!

## NI KORESPONDU

43jara oficisto bulgara, kiu jam korespondis kun usonaj esperantistoj, kaj estas kontenta kun iliaj konceptoj kaj lingvo-nivelo, ankoraŭ deziras havi pli multe da amikoj en usono. Li korespondos pri preskaŭ ĉiuj temoj, kaj interŝanĝos poŝtmarkojn aŭ insignojn. S-ro Ivan V. Ŝojkov, Loveĉko-Ugarĉin, Bulgario (Bulgaria.)

40jara instruistino en altlernejo, kiu loĝas en la Zamenhofa urbo Bialystok, kiu estas "magistro de Kemio," nun sin konsideras esti preta, laŭ lingvoscio kaj tempo, korespondi kun gesamideanoj en nia lando. Oni povas skribi pri diversaj temoj: naturo, muziko, vojaĝoj, ktp. F-ino Halina Parys, Ul. Garbarske 58/15, Bialystok, Pollando (Poland.)

65jara nova esperantisto (ekde 1969), usonano kaj membro de ELNA, volas korespondi Esperante, angle, aŭ eĉ en la finna lingvo. S-ro Albert Saily, box 171, Marenisco, Michigan 49947.

21jara nova esperantistino, kiu konvinkiĝis, ke Esperanto estas bona rimedo por amikeco inter popoloj, kaj kiu interesiĝis en usona kulturo, vivo, kaj lernado, deziras korespondantinojn. F-ino Nijole Indrelyte, Klaipeda, Baltijos Pr. 81-77, Litovio, Sovetunio (Lithuania, SSR.)

Japanaj gekorespondantoj atendas vin! Bonvolu skribi leteron, kun aĝo, sekso, kaj aliaj informoj, al S-ro Tanaka Sadami, Sekretario, Japana Esperanto-Korespondo-Servo, KLEG, 531 Oyodoku, Nakatu-Hanadori 3-10, Osaka, Japanio (Japan.)

31jara inĝeniero, kiu sin priskribis "la plej norda esperantisto," kolektas poŝtmarkojn kun pentraĵoj, kaj serĉas amikojn en usono. S-ro Aleksandr Vajsberg, Murmanskaja obl., Abonkesto 53, Monĉegorsk, CCCP-USSR (Russia).

Lernantoj eksterlandaj serĉas korespondadon internacie per sonbendoj. S-ro Klaus Schubert, Duvenstedter Triftweg 26c, D-2, Hamburg 66, FRG (Germany).

## ARTIKOLOJ

### L A 16 R E G U L O J

- aŭ -

### PROPAGANDO POR ESPERANTO SUR FALSA BAZO

(Artikolo de D-ro A. Baur, el Heroldo de Esperanto, Dec. 1, 1971, p.2.)

Estas strange, ke ne povas morti la legendo, ke la gramatiko de Esperanto konsistas el nur 16 reguloj. Eĉ la nova seslingva faldprospekto de UEA ripetas tiun nepruveblan aserton. Estas la sekreto de Zamenhof, kial li en sia unua publikigaĵo nomis nur 16 regulojn, sed li mem sciis pri la malkompleteco de tiu listo kaj li mem aplikis multe pli da reguloj kaj transdonis ilin ankaŭ al ni en la "Ekzercaro" kaj en la "Lingvaj Respondoj."

En kiom da reguloj oni volas formuli la gramatikon de Esperanto, estas arbitra afero - la "Plena Gramatiko" de K.k.W. uzas 414 paragrafojn - sed tutcerte absolute ne sufiĉas la nombro da dekses. Mi pruvos tion per la jenaj frazoj, kiuj enhavas gravajn pekojn kontraŭ la efektiva gramatiko de Esperanto, sed kiujn neniu korektisto rajtas riproĉi al mi surbaze de la 16 reguloj:

"Ili elektis lin prezidanton. Mi dankas vin vian helpemon. Ĝi pluvas. Estas necesa diri la veron en propagando. Salutinta li foriris. La trajno alveninta la pasaĝeroj eliris. Mi ordonas al vi ke vi venos. Li senkulpigis sin diranta ke li havis malbonan memoron."

La erarojn ĉiu scianto de Esperanto tuj eltrovos; sed kiu konas nur la 16 regulojn, ne malkovros eĉ unu. La 16 reguloj devas esti rigardataj sur la historia fono, sed hodiaŭ ili estas absolute malaktualaj. Estas nekorekte uzi ilin en nia propagando, ĉar oni kredigas ion al la homoj sciantaj nenion pri Esperanto, kio tuj montros sin malveraĵo, kiam ili eklernas la lingvon.

## P O E M O J

de Ella Gibson

### OKSIGENAĴO

Oksigenaĵo,
Same kiel mi, spiras
La kandelflamo.

Nur per gasgraco
Ni ambaŭ estas nun en
Nia lumdramo.

### NOTOJ

Kiel harpkordoj
Hazarde frapitaj, ni
Vibrade sonu.

Kaj senelekte,
Ĝis la dampilo, niajn
Tonojn eldonu.

### LAŬ VIA VOLO

La papilio
Tro firme mantenita,
Fariĝas polvo.

Kara amiko,
Vizitu aŭ lasu min,
Laŭ via volo.

## POEMOJ TRADUKITAJ DE L. ZAMENHOF

(El "Originalaj kaj Tradukitaj Poemoj de L. L. Zamenhof," de Adolf Holzhaus, 1970. Tiun ĉi poemon verkis H. Heine en la germana lingvo.)

| | |
|---|---|
| Mir träumte von einem Königskind,<br>Mit nassen, blassen Wangen;<br>Wir sassen unter der grünen Lind',<br>Und hielten uns liebumfangen. | En sonĝo princinon mi vidis<br>Kun vangoj malsekaj de ploro, -<br>Sub arbo, sub verda ni sidis,<br>Tenante nin koro ĉe koro. |
| "Ich will nicht deines Vaters Thron,<br>Und nicht sein Zepter von Golde,<br>Ich will nicht seine demantene Kron',<br>Ich will dich selber, du Holde." | "De l' patro de l' via la krono<br>Por mi ĝi ne estas havinda!<br>For, for lia sceptro kaj trono -<br>Vin mem mi deziras, aminda! |
| Das kann nicht sein, sprach sie zu mir,<br>Ich liege ja im Grabe,<br>Und nur des Nachts komm' ich zu dir,<br>Weil ich so lieb dich habe. | - "Ne eble!" ŝi al mi rediras:<br>"En tombo mi estas tenata,<br>Mi nur en la nokto eliras<br>Al vi, mia sole amata!" |

(Tiu ĉi elĉerpaĵo estas germana poemo verkita de L. Uhland.)

Droben stehet die Kapelle,
schauet still ins Tal hinab;
drunten singt bei Wies' und Quelle
froh und hell der Hirtenknab'.

Traurig tönt das Glöcklein nieder,
schauerlich der Leichenchor,
stille sind die frohen Lieder
und der Knabe lauscht empor.

Droben bringt man sie zu Grabe,
die sich freuten in dem Tal.
Hirtenknabe, Hirtenknabe,
dir auch singt man dort einmal.

Supre staras sur la monto
La silenta kapeleto,
En la valo, ĉe la fonto,
Ĝoje kantas paŝtisteto.

Sonorado, mortkantado
Nun eksonis tra l' silento, -
Haltis knabo en kantado
kaj aŭskultas kun atento.

En la tombojn de l' monteto
El la valo ĉiu venos.
Ankaŭ vin, ho paŝtisteto,
Oni iam tien prenos!

* * * * * * * * * * *

ALDONOJ POR LA LISTO DA DONACINTOJ AL LA UK-FONDUSO

Fred Mc Mann, S.V. Steinberg, H. K. Ver Ploeg. S-ino Peggy Linker, la kasistino, informis nin, ke S-ino Lisa Arnold donacis $200.00 je la memoro de sia edzo, D-ro Heinrich Arnold.

## OFICIALAĴO

AFERKUNSIDOJ DE LA ESPERANTO-LIGO POR NORDA AMERIKO OKAZOS EN LA KADRO DE LA UNIVERSALA KONGRESO EN PORTLANDO, LUNDE KAJ MARDE, LA 31an DE JULIO, KAJ LA 1an DE AŬGUSTO, JE LA 3:30 PTM. KUNVENLOKOJ ANONCOTAJ.

---

BONVOLU ELTRANĈI LA SUBAN PARTON KAJ SENDI ĜIN, KUN MONO, AL LA KASISTINO

---

ELNA 197__

Mi enmetas la kotizon kiel subindikitan. Mia nomo kaj adreso ĝuste aperas sur la alia flanko (dorsflanke).

KONTRIBUANTA MEMBRECO

___KONSTANTA ($8.00)
___EDZIĜPARA ($12.00)
___SUBTENA ($15.00)
___PATRONA ($25.00)
___DUMVIVA ($160.00)

Mi elektas la jenan senpagan gazeton:
___Kontakto
___Oomoto
___Heroldo (nur novaj abonantoj)

____KUNDONACO

* * * * * * * * * * * * * * * * * * *

___STUDANTO ($3.00), plentempa kaj malpli ol 30-jaraĝa _____NASKIĜJARO
___EKSIĜULO ($4.00), pli ol 62-jara post kvinjarabono.

NOVA ABONO_____

_____ABONRENOVIGO

# OFICIALA ELNA-ADRESARO


**PREZIDANTO**
Francis E. Helmuth
5526 Beaumont Ave.
La Jolla, Cal.
92037

**VICPREZIDANTO**
Mark Starr
3940-47th St.
Long Island City
New York, 11104

**SEKRETARIO**
Robert E. Bailey
147 Birch Street
Redwood City, Ca.
94026

**KASISTINO**
Peggy Linker
1414 Monroe St.
Walla Walla, Wash.
99362

**KORESPOND-DIREKTORINO**
Ellen A. Lewis
15 Salisbury Rd.
Brookline, Mass.
02146

**UEA-ĈEFDELEGITO**
Armin Doneis
P.O. Box 105
Pharr, Texas
78577

**INFORMCENTRO OKCIDENTA**
410 Darrell Road
Hillsborough, Cal.
94010

**ARKIVISTO**
D-ro B. J. Balcar
62 Via Castanada
Monterey, Ca.
93940

**INFORMCENTRO NOVJORKA**
156-5th Ave. Rm. 821
New York, N. Y.
10010


## POR STUDANTOJ

### KIOM DA TASOJ ?

Taksu la nombron da tasoj da kafo kiujn vi kutime trinkas aŭ tage aŭ semajne. Sur paperon skribu ĝin, kaj duobligu la nombron. Aldonu 5. Uzante tiun nombron, multipliku ĝin per la nombro 50. Nun zorge aldonu 1722, kaj poste subtrahu la jaron dum kiu vi naskiĝis. Vi nun havas rezulton, kiu montras kaj la nombron da tasoj kiujn vi trinkas kaj la aĝon kiun vi atingos dum ĉi tiu jaro! La unuaj du ciferoj (se estas du) montras la nombron da tasoj, kaj la finaj ciferoj montras la aĝon.

Mi donu al vi ekzemplon: S-ro Rodney Ring pensas, ke li kutime trinkas 4 tasojn da kafo ĉiutage. Li do duobligas 4, kaj havas 8. Aldoninte 5, li skribas sur la paperon 13. Tiun li multiplikas per 50, kaj li atingas la nombron 650. Zorge aldonante 1722, li skribas 2372. Ĉar li vere naskiĝis en la jaro 1927, li deprenas tiom. La fina nombro estas do 445. Vidu! La unua cifero montras, ke li trinkas 4 tasojn da kafo dum la tago, kaj 45 estas lia aĝo!

---

ESPERANTO LEAGUE for NORTH AMERICA
156 FIFTH AVENUE, NEW YORK, N Y 10010

NON-PROFIT ORG.
U. S. POSTAGE
Paid
Kutztown, Pa.
Permit No. 8

RETURN POSTAGE GUARANTEED
ADDRESS CORRECTION REQUESTED

[redacted]